## *Stefano Keller, ĉefreprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo*

# *Raporto pri la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo 2008-2010*

## 2008

*La jaro 2008a estis riĉa je poresperantaj kaj porlingvorajtaj agadoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Krom la granda evento, la* ***Simpozio pri lingvaj rajtoj en la mondo****, organizita de* ***Universala Esperanto-Asocio*** *ĉe* ***UN****, la 3 reprezentantoj de UEA, Charmian Common, Cesco Reale kaj Stefano Keller, partoprenis plurajn eventojn en la Palaco de Nacioj kaj plurfoje havis okazon interveni en la kunsidoj.*

*Nia aktiva kaj ofta ĉeesto en UN estis fruktodona ankaŭ surkampe de la kontaktoj kun reprezentantoj de diversaj NRO-oj, kiujn ni renkontis tie, kaj kun la aktivuloj de CoNGO. La partopreno de reprezentantoj de UEA en la laboro de diversaj aranĝoj en la ĝeneva oficejo de UN ebligis en tiu medio vastan kaj efikan informadon pri Esperanto, pri UEA kaj pri nia* ***Agado por Lingvaj Rajtoj (ALR)****.*

*Ĉefaj eventoj de la jaro, kiujn ni partoprenis:*

**2008-04-24 - Simpozio pri lingvaj rajtoj en la mondo, okaze de la 100-jariĝo de UEA kaj de la 60a datreveno de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj, UN, Ĝenevo**
Tiu ĉi estis la granda evento de la jaro, kies organizado fare de UEA estis okazo por firmigo de ekzistantaj kaj por akiro de novaj kontaktoj en la UN-Oficejo de Ĝenevo. Krome, ni povis kontakti diversajn organizajhojn laborantaj por la homaj, minoritataj, indiĝenaj aŭ prilingvaj rajtoj, kaj tiel ebligi estontan kunlaboron kun ili. La Simpozion partoprenis famaj fakuloj, lingvistoj kaj reprezentantoj de gravaj NRO-j. Ekdiskutiĝis projekto organizi aliajn similajn eventojn kunlabore kun NRO-j, UN kaj Universitatoj.

**2008-09-01/03 – 1-a Socia Forumo pri malriĉeco, organizis: Homrajta Konsilio (HRK)**
Ni partoprenis la forumon kaj intervenis je 2 okazoj proponante niajn servojn per Esperanto kiel pontolingvo. La prezidanto de la forumo, reagis tre pozitive al niaj intervenoj kaj pluraj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto.

**2008-09-08/26 - 9-a Sesio de la Homrajta Konsilio (HRK) de Unuiĝintaj Nacioj**
Nia interveno konsistis el ripeto de nia propono de servoj al la Socia Forumo, plia informado pri la esperantista agado por lingvaj rajtoj kaj el la konfirmo de nia subteno al *EBLUL*, kiu laboras por la aprobo de la *deklaro pri lingvaj rajtoj*.

**2008-10-27/28 - Civil Society Development Forum 2008, Geneva Component, CoNGO**
Partopreno en la evento donis al ni plian okazon por krei kaj flegi kontaktojn, transdoni promesitajn tradukaĵojn al CoNGO-anoj.

**2008-12-12 - Memorsesio de la Homrajta Konsilio celebranta la 60-an datrevenon de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj**. Tio estis alia okazo rekontakti konatajn personojn el NRO-j, krei novajn kontaktojn kaj informadi pri nia agado por lingvaj rajtoj.

**2008-12-15/16 - 1-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj, organizis: Homrajta Konsilio**
En du alparoloj, la 15-an kaj la 16-an de decembro, la reprezentantoj de UEA diskonigis la starpunkton de Universala Esperanto-Asocio pri lingvaj rajtoj, atentigis pri la situacio de minoritataj lingvoj kaj prezentis la avantaĝojn de Esperanto.

Ekde tiu evento ni komencis la pretigon de videointervjuoj kun ĉeestantoj elektitaj laŭ ties organizaĵo aŭ alparoltemo (indiĝenoj, lingvorajtistoj). Por ties publikigo nova videokanalo estis kreita ĉe Youtube : www.youtube.com/LinguisticRights kiu aldoniĝis al la kanalo: www.youtube.com/EsperantoTv ekzistinta jam ekde oktobro 2007 kaj prezentanta ĉefe la intervenojn de UEA-reprezentantoj en kunsidoj ĉe UN, Ĝenevo, ekde septembro 2008.

## 2009

*En 2009 kreskis nia ĝeneva teamo al kvin UEA-reprezentantoj kaj Stefano Keller iĝis la ĉefreprezentanto, daŭrigante tiel la ĝistiaman kompetentan laboron de Charmian Common en tiu rolo. La triopon, kiun ili formis kun Cesco Reale, kompletigis la alveno de Nicole Margot kaj Mireille Grosjean. Tiu kvinopeco ekde tiam permesas dividi la laboron inter la laŭokaze pli disponeblaj teamanoj kaj alportas pli da kontribu-ideoj en nia agado, pli da okazoj reprezenti UEA-n en la Palaco de Nacioj. Foje ĉeestas nur unu el ni, aliajn fojojn 2, 3 aŭ 4 samtempe. Ankaŭ tiu varia apero de diversaj vizaĝoj esperantistaj havas pozitivan efikon ĉar la tieaj ĉeestantoj, ĉu NRO-aj, ĉu ŝtataj, tiel povas observi la realan ekziston kaj funkciadon de la vivanta internacia lingvo.*

*Dum 2009 nia aktiveco konsistis el malpli da intervenoj dum UN-kunsidoj (ne ĉiuj temoj traktataj permesas niateman alparolon), sed ĝi estis despli riĉa en kontaktoj kun reprezentantoj de diversaj NRO-j, kio ja estas same grava en nia aktiveco ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ni partoprenis kelkajn paralelajn eventojn organizitaj de CoNGO kaj de diversaj organizaĵoj defendantaj homajn rajtojn, okazintaj dum la ordinaraj aŭ specialaj kunsidoj de la Homrajta Konsilio.*

*Kelkaj menciindaj eventoj de la Homrajta Konsilio:*

**2009-03-23 - UEA-interveno pri lingvaj rajtoj, 10-a sesio de la Homrajta Konsilio, UN, Ĝenevo**
La temo de nia unua interveno ĉe la Homrajta Konsilio en 2009 estis la prezentado de 4 kazoj de rompoj de lingvaj rajtoj (Malajzio, Danlando, Turkujo kaj Aŭstralio).

**2009-08-31/09-02 – 2-a Socia Forumo de la Homrajta Konsilio (HRK) , UN, Ĝenevo**
Dum nia ĉeesto ni povis krei novajn kontaktojn kun diversaj partoprenantoj de la Forumo (kaj flanke de diversoriginaj reprezentantoj, kaj flanke de la prezida stabo de la Forumo), informi, interesigi pri Esperanto.

**2009-09-14/10-02 - 12-a Sesio de la Homrajta Konsilio (HRK) de Unuiĝintaj Nacioj**
Tiusesie ni prezentis du kazojn de lingva diskriminacio (Barato, Slovakio), sed ankaŭ gratulis registarojn (Malajzio kaj Bolivio) pro ties favorigo de la instruado per kaj de la lokaj, indiĝenaj lingvoj.

**2009-11-12/13 – 2-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj, organizita de la Homrajta Konsilio (HRK), UN, Ĝenevo**
La 12-an de novembro, laŭ nia invito kaj organizado, intervenis gestolingve en la Forumo reprezentantino de la Federacio Svisa de Surduloj, informante pri la problemoj de tiu minoritato lingva. La 13-an de novembro okazis nia interveno, en kiu ni atentigis pri la bezono protekti la lingvajn minoritatojn kaj disponigi al ili la necesajn kondiĉojn, kiuj ebligas efektivan kaj plenan realigon de iliaj lingvaj rajtoj.

## 2010

Ĉi-jare, en 2010, ni jam partoprenis/intervenis en UN-kunsidoj kaj aktive ĉeestis paralelajn eventojn de NRO-j okazigitaj en la Palaco de Nacioj aŭ en la propraj oficejoj de CoNGO.

**2010-03-11 – Fakula kunsido pri la Kodigo de la Homa Rajto je Paco**
UEA apogis per kunsubskribo la skriban deklaron de la organizinto, Hispana Societo por Internacia Homrajta Leĝo, kompletigante la tekston de la Rekomendoj pri la Kodigo de la Homa Rajto je Paco per frazero pri lingvaj rajtoj. Dum tiu kunsido UEA-reprezentanto prezentis la starpunkton kaj aktivecojn de nia organizaĵo en rilato kun tiu temo.

**2010-03-01/26 - Homrajta Konsilio (HRC) de Unuiĝintaj Nacioj, 13-a Sesio**
Interveno de Universala Esperanto-Asocio por lingvaj rajtoj de minoritatoj, specife pri lingvouzo ĉe UN dum kunsidoj kaj en diversaj retejoj de la tutmonda organizaĵo. Ni alvokis por deklari la jardekon 2012-2021 : ‘jardeko de lingvoj’.

**2010-06-04 – Videbleco de la Homrajta Konsilio, organizita de CoNGO, ĉe UN, Ĝenevo**
Dialogo kun internaciaj amaskomunikantoj pri diskonigo de la laboro de la Homrajta Konsilio. Okazis UEA-alparolo pri niaj ebloj perantaj helpe de la interetna pontolingvo, Esperanto.

**2010-06-08 – NRO-kunveno organizita de la Homrajta Komitato de CoNGO, Ĝenevo**
Neformala renkonto interparola, kun ĉeesto de CoNGO-stabanoj, inkluzive de CoNGO-prezidanto, Liberato Bautista. Okazis konversacioj kun pluraj interesiĝantoj pri Esperanto kaj kun CoNGO-stabanoj kaj ~prezidanto pri nia aktiva kunlaboro en tiu Komitato.

**2010-06-16 – Ĝenerala Informa Kunveno por CoNGO-membroj, ĉe CoNGO, Ĝenevo**
Raporto pri diversaj CoNGO-eventoj (Novjorko, Ĝenevo), informado pri sciindaĵoj fare de s-ro Cyril Ritchie, unua vicprezidanto de CoNGO.

* * *

## *RESUMO – KONSTATOJ*

Kiel ĝenerala resumo, kun objektiveco ni povas konstati signifan progreson dum la lastaj 2 jaroj en nia agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Tio mezureblas per la kreskanta nombro de okazoj de nia ĉeesto en eventoj, ĉu UN-aj, ĉu NRO-aj; per la kreskanta nombro de niaj alparoloj en tiuj eventoj; per la iom post iom kreskanta nombro de lingvoversioj de niaj alparoltekstoj (lastatempe jam en la ses oficialaj lingvoj de UN) submetendaj al la kunsida sekretariejo; per la kreskanta nombro de niaj kontaktoj kun reprezentantoj de NRO-j, per nia spertiĝo en ĉiam pli da aspektoj de la laboro, en proceduroj, agmanieroj en tiu monda organizaĵo. Kaj ni povas diri, ke progreso montriĝas ankaŭ en la kvalito de la reago, rilato al ni, observebla ĉe pli kaj pli da delegitoj, reprezentantoj kunvenantaj en la Palaco de Nacioj por diskuti pri la problemoj de la mondo. Tio koncernas ankaŭ la funkciulojn, kunlaborantojn de la ĝeneva oficejo de UN.

Tamen, ĉio tio ne signifas, ke ni povas malrapidiĝi, maldiligenti en nia agado nun, ripozi aŭ tro kontenti pri la faritaĵoj, pri la aktuala situacio kaj rezultoj. Ni devas ankoraŭ multon lerni, sperti, fari tie. Labori, esplori pri la traktotaj temoj, ĉiam pli bone nin pretigi al kunsidoj, alparoloj. Ni devus produkti profesiaspektajn informilojn, do restas ankoraŭ farendaĵoj por la venontaj periodoj.

Mi vidas eblojn malfermiĝantaj al ni iom post iom ĉe CoNGO, rezulte de la plioftiĝintaj kontaktoj lastatempe. Sed tutcerte ankaŭ pro tio, kion ili vidas el nia aktiveco, alparoloj en kunsidoj. Ili volas ke ni aktive kunlaboru. Ni antaŭeniru do prudente kaj bonstrategie, pripensante sur tiu vojo.

Estas fakto, ke ni ne estas en la sama situacio, kiel plentempaj diplomatoj aŭ salajrataj reprezentantoj de organizaĵoj, nia plentempa aktiveco vivtena estas por la plimulto el ni io alia ol tiu ĉi agado. Ni investas nian tempon, energion kaj monon en tiun aktivecon *aldone* al niaj ĉefaj devoj, plenumendaĵoj profesiaj kaj familiaj.

Por povi pli kaj pli profesiigi nian agadon, kaj iĝi pli efika, ni devas pripensi la eblojn de financado, ni kunlaboru kun UEA-reprezentantoj ĉe Unesko, kaj kun la aktivuloj por indiĝenaj popoloj, ni kunlaboru kun, akiru subtenon de lingvistoj, lingvorajtaj juristoj.

*Nia retejo komencas esti konata kaj ek-alvenas kontaktopetoj:*
***http://www.lingvaj-rajtoj.org***

*Mi dankas ĉiujn membrojn de nia teamo, inkluzive la membrojn de la ALR-retgrupo, kiuj same sindone partoprenas en nia agado por lingvaj rajtoj, konsilante, tradukante, deĵorante dum niaj partoprenoj en UN-eventoj.*

***Stefano Keller, la 15-an de julio 2010***

**Homrajta Konsilio** aŭ **Konsilio pri Homaj Rajtoj (HRK) – Human Rights Council (HRC) – Conseil des Droits de l'Homme (CDH) - http://www.ohchr.org**

**CoNGO – The Conference of NGOs in Consultative Relationship with the United Nations - la conférence des ONG en relation consultative avec les Nations Unies - la conferencia de ONG con relación consultiva con las Naciones Unidas - http://www.ngocongo.org**

**EBLUL – European Buroo of Lesser Used Languages – Eŭropa Buroo de Malpli Uzataj Lingvoj (bedaŭrinde tio ĉesis ekzisti fine de 2009)**